

Lima Barreto

Klara de la Anĝeloj

Tradukis Paulo S. Viana



Sanpaŭlo

2026

Tradukis: Paulo S. Viana
Reviziis: Francisco Stefano Wechsler
Enpaĝigis: José R. Tenório
Eldonis: Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (EASP)
Presis: fabricadolivro.com.br

Ĉi tiu verko estas uzebla laŭ la permesilo Krea
Komunaĵo Tutmonda, kun atribuo kaj sen modifo
(CC BYND 4.0), disponebla ĉe:
<https://creativecommons.org/licenses/bynd/4.0/>

© Paulo Sergio Viana (Traduko), 2026

La tradukinto esprimas ĉi tie plej koran dankon al la reviziintoj
Francisco S. Wechsler kaj **José R. Tenório**, kiuj plurloke purigis
la Esperantan tekston. Sed kompreneble, se makuloj ankoraŭ
restas, pri tio kulpas sole nur la tradukinto, kiu petas de la
leganto indulgon.

B273k

Barreto, Lima.

Klara de la Anĝeloj / Lima Barreto; tradukita de Paulo Sergio Viana. –

1^a. eld. – Sanpaŭlo : Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, 2026.

256 p. – 21 x 14 cm.

Originala titolo: Clara dos Anjos.

ISBN 978-85-67422-31-2

1. BRAZILA ROMANO. I. Viana, Paulo Sergio, *trad.* II. Titolo.

CDD 869.934

Enhavo-tabelo

Prezento	7
I	11
II	29
III	54
IV	70
V	86
VI	106
VII	124
VIII	158
IX	188
X	214
Notoj	247

PREZENTO

Lima Barreto, pioniro

Paulo S. Viana

Lima Barreto okupis tute specialan lokon en la panoramo de la brazila literaturo. Li naskiĝis en la jaro 1881, en Rio-de-Ĵaneiro, kiam en la lando ankoraŭ estis permesate laŭleĝe sklavigi homojn. Fakte, Brazilo heredis plurjarcentan teruran sklavigadon, kiu venigis milionojn da afrikanoj en tia hontiga situacio. Tiu speco de stigmato markis la kulturon de la brazila popolo per makulo, kiu vidiĝas ĝis la nuntempo. Brazilo estis la lasta lando en okcidento, kiu forigis tiun hontaĵon.

Lima Barreto vidis la liberigon de sklavoj, kiam li estis ankoraŭ knabo. Lia avino estis sklavino, kiu havigis al si liberecon, kaj li devenis de malriĉa familio. Nome, li estis malriĉa nigrulo. Li frue orfiĝis, sed danke al la helpo de baptopatro el la riĉa socia tavolo, li sukcesis ricevi lernadon kaj edukiĝon. Li matrikuliĝis en fakultaton de inĝenierarto, sed ne

sukcesis fini la kurson, ĉar li devis labori por subteni la familion.

Ankoraŭ en frua aĝo li eksuferis de krizoj de mensmalsano, verŝajne pro “skizoida-afekcia perturbo”. Krome, lin trafis alkoholismo, kio pligravigis lian sanon kaj dufoje kondukis lin en mensmalsanulejojn. Li mortis nur 41-jaraĝa.

Li verkis multajn rakontojn, kronikaĵojn, romanojn kaj artikolojn por gazetoj. Lia literaturo situas inter simbolismo kaj modernismo. Oni konsideras lin unu el la enkondukintoj de la modernisma movado en Brazilo. Liaj ĉefaj temoj estis la diskriminacio pro raso kaj la neglektado de la malaltaj sociaj klasoj fare de la potenculoj. Lia stilo variis inter realismo kaj ironio, ĉiam kun forta tendenco al kritikemo kontraŭ sociaj maljustaĵoj. Cetere, li mem estis ofta viktimo de antaŭjuĝoj kaj malrespekto.

“Klara de la Anĝeloj” estas tipa produkto de Lima Barreto. Ne nur pro la enhavo, montranta socian klason el krudaj, simplaj homoj, ofte implikitaj en drinkado, en naiva mondrigardo, vivantaj iom sensencan vivon. Tipa ankaŭ pro la stilo. La aŭtoro miksas elegantecon kun krudeco ankaŭ en la maniero viciĝi la sinsekvajn epizodojn de la rakonto, en iom ĥaosa maniero. Li ofte digresias, imitas la popolajn dirmanierojn, ripetas analizojn iom obsede. La psikologiaj trajtoj estas tie kaj tie iom skemecaj, iom malsubtilaj. La aŭtoro sin esprimas tute kvazaŭ li

mem estus unu el tiuj homfiguroj, jen patosaj, jen ridindaj, kiuj paradas laŭ la paĝoj de la rakonto. Eble tia estis lia maniero solidari kun tiuj simplaj popolanoj, kiuj estis fakte “lia gento“. En “Klara de la Anĝeloj” li pentras la melankolian staton de la malalta klaso en Rio, en la 19-a jarcento, al kiu mankis eduko, fundamentaj rajtoj kaj perspektivo por progreso. La ekspluatado kaj mistraktado de virinoj, en tempo, kiam tio estis tute ignorata, estas interesa aspekto de la verko. La homfiguroj estas montrataj en malsubtila psikologia maniero, kiu trafe montras la staton de popolo, kies minimumaj rajtoj estis tute forlasataj de la politikistoj. La respubliko estis proklamita en la jaro 1889, unu jaron post la abolo de sklaveco. Sed demokratio estis ankoraŭ fora revo...

Lima Barreto mortis en 1922, kaj “Klara de la Anĝeloj aperis libroforme nur en 1948.

Li neniam estis elektita membro de la Brazila Akademio de Beletro. Li kandidatiĝis dufoje, en 1918 kaj 1922, sed estis rigardata kun antaŭjuĝo, pro sia afrikana deveno, pro sia denunca literaturo kaj pro sia kritikemo al pedanta, elitisma akademiismo. Li rigardis la Akademion elitula konservativa institucio. Nur multajn jarojn post lia morto la Akademio rekonis lian valoron kaj omaĝis lin.

I

La leterportisto Joakimo de la Anĝeloj ne inklinis al serenadoj kaj serenadaj komponaĵoj; sed al li plaĉis gitaro kaj popolaj laŭmodaj kanzonetoj. Li mem ludis fluton, nome muzikinstrumenton iam tre ŝatatan en pasinta tempo, nuntempe jam ne. La maljunaj homoj en Rio-de-Ĵanejro, ankoraŭ hodiaŭ, memoras la faman Calladon⁽¹⁾, kaj liajn polkojn, el kiuj unu — sub la titolo “Ve, mia kuzino!” — estas emociiga memoraĵo por Rianoj, kiuj nun alproksimiĝis al la sepdeka aĝojaro. De certa tempo, tamen, fluto falis en malprestigon, kaj unu sola flutisto de la nuna tempo sukcesis, por momento, restarigi tiun ravan muzikilon — kiu estis granda ĝuo por niaj gepatroj kaj geavoj. Mi aludas al Patápio Silva⁽²⁾. Post lia morto, fluto denove okupis duaflankan lokon kiel muzikinstrumento, al kiu la doktoroj pri muziko, ĉu ludantoj, ĉu erudiciaj kritikistoj, tute ne atentis. Ĝi denove fariĝis plebano.

Malgraŭ tio, en sia simpleco denaska, laŭ deveno kaj socia kondiĉo, Joakimo de la Anĝeloj kredis sin iom valora muzikisto, ĉar krom ludi fluton, li komponadis valsojn, tangojn kaj muzikajn akompanaĵojn por laŭmodaj popolkantoj.

Unu lia polko — sub la titolo “Sen-unga markrabeto” — kaj unu valso — “Suferoj de la koro” —

atingis iom da sukceso, kaj li eĉ vendis la posedon de ĉiu el ili kontraŭ kvindek milrejsoj al iu vendejo de muziko kaj pianoj ĉe la Strato Ouvidor⁽³⁾.

Lia scio pri muziko estis malforta; li prefere divenadis, anstataŭ apliki teoriajn nociojn, kiujn li eventuale estis lerninta.

Li lernis “etan arton” pri muziko en sia naskiĝloko, en la proksimeco de Diamantino⁽⁴⁾, en kies preĝejaj festoj lia fluto briladis, kaj kie multaj homoj rigardis lin la unua flutisto. Kvankam li ĝuis tian entuziasmigan famon, li neniam emis plivastigi siajn muzikajn konojn. Li restis je la “eta arto” de Francisco Manuel⁽⁵⁾, kiun li parkere sciis; sed li ne eliris el ĝi, ne iris antaŭen.

Li estis ne tre ambicia pri muziko, kaj ankaŭ pri la aliaj manifestiĝoj de sia vivo. Malkontenta pri la banala vivo en sia eta naskiĝurbo, unu certan tagon, kiam li estis ĉirkaŭ dudek-du-jaraĝa, li akceptis la inviton de angla inĝeniero, kiu en tiu regiono esploradis grundojn kaj diamanthavajn lokojn. Ĉiu supozis, ke “sinjoro mister” tion faradas; fakte, tamen, la angla saĝulo faris senprofitajn studojn. Li simple kaj platone faris geologiajn kaj mineralogiajn esplorojn. Ne diamanto estis la celo de liaj laboroj; sed la popolo, kiu obstine vidis ĉirkaŭ la urbo la ventron de la tero plena de diamantoj, ne povis supozi, ke anglo kolektanta ŝtonojn, de mateno ĝis vespero, faranta notojn kaj tenanta strangajn instrumentojn,

ne estus per tiaj ekstravagancoj ĉasanta diamantojn. Ne troviĝis maniero, ke la “mister” povus konvinki la simplanimajn homojn de tiu loko, ke li ne interesiĝas pri diamantoj; kaj ne pasis unu sola tago, en kiu la regato de Lia Moŝta Reĝo ne ricevis ian proponon por vendo de terenoj, kie nepre devus abunde ekzisti la valora ŝtono, laŭ iaj ĝustaj indikoj de la okuloj de la sperta “diamantserĉisto”.

Tuj post la alveno de la geologo, Joakimo dung-iĝis kiel lia servisto, gvidanto, pakisto, purigisto, k.s., kaj li tiel obeeme kaj kontentige servis la saĝulon, ke ĉi tiu, fininte siajn esplorojn, invitis lin veni al Rio-de-Ĵaneiro, kun la tasko movi lian ŝtonplenan aŭ ŝtonecan bagaĝon, ĝis ĝi trafos en la ŝipon. La saĝulo promesis pagi lian restadon en Rio, kion li faris, ĝis li enŝipiĝis al Eŭropo.

Li donis al li monon por reveno, korkan ĉapelon, tibiingojn, pipon kaj skatolon da tabako Navy Cut; Joakimo jam estis al kutimiĝinta al Rio-de-Ĵaneiro, post iom pli ol monato kaj duono, dum kiu li restis ĉi tie, servante Sinjoron John Herbert Brown, el la Reĝa Societo de Londono; kaj li decidis ne reveni al Diamantino. Li vendis la tibiingojn en brokantejo, kaj ankaŭ la korkan ĉapelon; kaj li ekfumis la bongustan anglan tabakon al li donacitan, kaj promenadis en Rio, dum li ankoraŭ posedis monon. Kiam ĝi finiĝis, li serĉis konatojn jam akiritajn; kaj baldaŭ li havigis al si laboron kiel dungito en oficejo de

granda advokato, lia samŝtatano, nome, el la ŝtato Minas Gerais⁽⁶⁾.

— Mi ne proponos al vi ion tre valoran — tuj diris al li la doktoro — sed ĉi tie vi ekkonos homojn kaj povos trovi ion pli bonan, poste.

Li bone vidis, ke la “doktoro” diris al li la veron, kaj lia tuta ambicio fiksiĝis je la akiro de malgranda publika posteno, kiu donus al li rajton je pensiigo kaj asekuro por la familio de li starigota. Post du jaroj da laboro, li havigis al si tiun oficon de leterportisto, jam antaŭ dudek jaroj, kaj li estis tre kontenta kaj feliĉa en sia vivo, des pli ke li meritis ricevi sinsekvajn promociojn.

Kelkajn monatojn post la dungigo, li edziĝis; kaj ĉar lia patrino mortis, en Diamantino, kaj li estis sola filo, li heredis de ŝi la domon kaj iom da tero en Inhaí⁽⁷⁾, distrikto de tiu urbo en Minas Gerais. Li vendis la modestan heredaĵon kaj tuj aĉetis tiun dometon en la antaŭurba regiono, kie li ankoraŭ loĝis, kaj kiu al li apartenis. Ĝia prezo estis modera, sed eĉ tiel la mono de la heredaĵo ne sufiĉis, kaj la ceteron li pagis laŭparte. Nun, tamen, jam de pluraj jaroj, li plene posedis sian “groton”, tiel li kutime alnomadis sian modestan dometon. Ĝi estis simpla. Ĝi enhavis du dormoĉambrojn; unu malfermiĝis al la vizitoĉambro, kaj la alia al la manĝoĉambro, la unua situis dekstre kaj la dua maldekstre de la enirejo. La vizitoĉambron tuj sekvis la manĝoĉambro.

En la fundo, responde al iom pli ol unu triono de la tuta larĝo de la domo, troviĝis ia spaceto, kie situis la kuirejo kaj tre malgranda provizejo. Tiu spaceto komunikiĝis kun la manĝoĉambro per pordo; kaj la provizejo, maldekstre, okupis parton de la spaco, per nelonga koridoro, ĝis la kuirejo, kiu okupis tutan ĝian larĝon. La pordo, kiu kondukis al la manĝoĉambro, situis tute proksime al la ĉi-lastata ĉambro, kaj per ĝi oni povis iri al la korto. Tia estis la plano de la proprietaĵo de Joakimo de la Anĝeloj.

Ekster la ĉefa domkonstruaĵo ekzistis ia kabano, kiu enhavis banejon, akvopelvon, k.s., kaj la korto estis sufiĉe vasta, kaj tie kreskis gujavuoj, du-tri oranĝuoj, unu galegtipa citronujo, papavujo kaj unu granda, larĝbranĉa tamarindujo, en la fundo.

La strato, ĉe kiu situis lia domo, etendiĝis ebena kaj, kiam pluvis, ĝi pleniĝis de akvo, kaj fariĝis kva-zaŭ marĉo; tamen, ĝi estis iom loĝata, kaj fariĝis natura vojo el la flankoj de Central⁽⁸⁾ ĝis la malproksima kaj dense loĝata kvartalo Inhaúma⁽⁹⁾. Ĉaregoj, ĉaroj, kamionoj, kiuj preskaŭ ĉiutage iras en tiu regiono por provizi al etkomercistoj varojn siavice liveritajn de grandkomercistoj, iradis tie de unu flanko al la alia, kio indikis, ke tiu strato devas ricevi pli da atento flanke de la aŭtoritaruloj.

Ĝi estis strato trankvila, kaj ĝi tuta, aŭ preskaŭ tuta, estis formita laŭ antikva gusto de ĉirkaŭurba inklino, laŭ ĉaleda stilo. Ĝi estis loĝata kaj tie oni

konstruis domojn preskaŭ tute ambaŭflanke. De ĝi oni povis admiri belegan panoramon el montaroj de variaj koloroj, laŭ la taghoroj kaj laŭ la stato de la atmosfero. Ili estis tre foraj, sed aspektis kvazaŭ ili ĝin ĉirkaŭus, kaj la strato mem ŝajnis akso de tiu sinsekvo de rondaj montoj, kiuj dum la tago ŝajnis prilumitaj per lumradioj, kaj sin kovris per tuta gamo de verdo, de bluaj tonoj; kaj je la krepusko, ili kovriĝadis per oro kaj purpuro.

Krom la tradiciaj urbaj ĉaledoj, troviĝis aliaj domtipoj. Iuj relative novaj, kun iaj rafinitaj ornamaĵoj kaj modernaj delikataĵoj, kiuj kaŝis ilian malgrandecon de ĉambroj kaj pravigis la troan luprezon. Sed estis unu domo vidinda. Ĝi staris meze de vasta bieneto, kaj ĝi estis tipa kiel la domoj de malnovaj bienetoj de pasinta tempo; longa fasado, ne tre granda malantaŭa parto, nealta plafono, kahelita ĝis la duona alto de la muroj. Iom malbela, efektive, sen ĉarmo; sed ĝi perfekte harmoniis kun la mangarboj, kun la fortikaj jakvujoj kaj la arogantaj kokosarboj kaj kun ĉiuj tiuj grandaj kaj malgrandaj maljuniĝintaj arboj, kiujn eble homoj plantis, sed ne vidis ilian fruktodonadon. Inter ili, kie oni povis vidi la restaĵojn de antikva ĝardeno, troviĝis statuetoj el portugala fajenco, kun bluaj skribaĵoj. Unu estis la “Printempo”; alia, la “Aŭroro”; preskaŭ ĉiuj tamen estis mutilitaj; unuj, je unu brako; aliaj ne havis kapon, kaj krome aliaj kuŝis sur la grundo, renversitaj de sur siaj krudaj bazoj.

La muroj, kiuj ĉirkaŭis la domon, je ioma distanco, kaj eĉ tiu, sur kiu apogiĝis la fera krado en la antaŭa parto de la konstruaĵo, estis kovritaj de hedero, kiu ilin volvis tute aŭ parte, ne kiel mortotuko, sed kiel severa, ceremonieca kaj viveca mantelo de alia epoko kaj de aliaj popoloj, kio estigis respirojn kaj rememorojn, kaj vigligis la ruinaĵon. Nuntempe, oni malofte vidas en Rio-de-Ĵanejro muron kovritan de hedero; sed antaŭ tridek jaroj, en la kvartalo Laranjeiras⁽¹⁰⁾, ĉe Strato Grafo Bonfim, en la kvartalo Rio Comprido⁽¹⁰⁾, en la kvartaloj Andaraí⁽¹⁰⁾ kaj Engenho Novo⁽¹⁰⁾, fine, en ĉiuj kvartaloj, kiuj estis en pasinta tempo lokoj por ripozado kaj plezuro, troviĝis, post ĉiu paŝo, longaj muroj kovritaj de herbo, elradiantaj melankolion kaj sugestantaj rememorojn.

Joakimo de la Anĝeloj iam konis la “bieneton”, kiam en ĝi loĝis la koncernaj posedantoj; sed lastatempe ili estis foririntaj kaj luintaj ĝin al la “bibliuloj”⁽¹¹⁾. Iliaj kantoj, ĉiusabate (tio estis ilia semajna tago por sankta ripozado), kiuj sonadis preskaŭ post ĉiu horo, plenigis la regionon kaj estigis aŭdadon de malĝoja, ombra mistiko. La loĝantaro ne rigardis ilin malŝate, eĉ iuj humilaj viroj kaj malriĉaj junulinoj el la ĉirkaŭaĵo ilin partoprenis, jen ĉar ili trovis en tio ian signon de intelekta supereco super siaj kunhomoj, jen por serĉi en alia religia domo, ekster la tradicia, mildigon al siaj kompatindaj vunditaj

animoj, krom la doloroj, kiuj sekvas ĉian ajn homan vivon.

Kelkaj homoj, inter ili Johano Farbisto, pravigis sian frekventadon inter la “bibliuloj”, ĉar — laŭ li — ili ne agis kiel la pastroj, kiuj por ĉio petas monon.

Tiu Johano Farbisto laboris en veturilriparejo en la kvartalo Engenho de Dentro⁽¹²⁾, en ofico, kiu estigis lian kromnomon. Li estis malhelhelnigrulo, kun dikaj lipoj, elstaraj vangoj, mallarĝa frunto, tre bonaj, helblankaj dentoj, longaj brakoj, grandaj manoj, longaj kruroj kaj tiaj piedoj, ke ne troviĝis en ŝuvendejoj ŝuoj sufiĉe grandaj por vesti ilin. Li mendis ilin; sed eĉ tiel, apenaŭ li surmetis ilin, en la sekva tago li devis tranĉi ilin per tranĉilo, se li volis iom paŝi kaj ne tre lami ĝis la strata ludfoiro.

Diradis “Turuna”, partiano de Pastro Sodré, kapelano en la Sanktejo de Nia Sinjorino de Lourdes, ke Johano Farbisto aliĝis al la “bibliuloj” pro tio, ke ili donis al li ĉambron, en la bieneto, por ke li tie loĝu senpage, kun iuj etaj plenumendaj devoj. Johano Farbisto neis tion emfaze; sed estis fakto, ke li loĝis en la bieneto.

Estris la protestantojn usonano, Mr. Quick Shays⁽¹³⁾, homo firma kaj plena de biblia elokvento, kiu certe estis majesta en uzado de la angla lingvo; sed en lia lama portugala lingvo fariĝis simple pitoreska. Shays Quick aŭ Quick Shays apartenis al tiu kurioza raso de yankees⁽¹⁴⁾, kiuj fondis novajn

kristanajn sektojn. De tempo al tempo, iu protestanta civitano el tiu raso, kiu deziras feliĉon al ni ĉiuj, sur la tero kaj en la ĉielo, sub la lumo de sia interpretado de unu aŭ pliaj versikloj de la Biblio, fondas tute novan sekton, komencas diskonigi ĝin kaj tuj trovas sindediĉajn adeptojn, kiuj ne bone scias, kial ili iris al tiu tute nova religieto, kaj kiu estas la diferenco inter ĉi tiu kaj la alia, el kie ili devenis.

Tie, en sia lando, same kiel ĉi tie, tiuj etaj Luteroj estigas sekvantojn; tie eĉ pli ol ĉi tie. Mr. Shays havigis al si, en la ĉirkaŭaĵo de la leterportisto Joakimo de la Anĝeloj, ne sekvantojn, sed multajn aŭskultantojn, el kiuj unu kvinono fine konvertiĝis. Kiam oni devis komenci novan grupon, la novicoj dormadis en barakoj starigitaj ĉirkaŭ la domo, en spacoj troveblaj inter la malnovaj arboj de la bieneto, kiun oni mistraktis kaj neglektis.

La preparaj ceremonioj al inicado, en la religio de Mr. Quick Shays, daŭris unu semajnon, plenan de fastoj kaj religiaj kantoj, plenaj de sanktoleado kaj severaj petegoj al Dio, Nia Patro; kaj la malnova loĝejo por ripozado, pro la militistaj barakoj kaj senĉesa psalmado, alprenis ian strangan, neantaŭvideblan aspekton, kiel de monaĥejo en libera aero, maskita per ekstravaganca vizaĝo de militista tendumejo. Oni emus diri, ke ĝi estas taĉmento de ia ordeno de militista-monaĥa-kavalerio, kiu sin pre-

paris por kontraŭbatali turkon aŭ malpian maŭron, en Palestino aŭ en Maroko. Ne multaj ortodoksaj anoj de la religia doktrino de Mr. Shays apartenis al tiu regiono; tamen, krom la jam menciitaj tipoj, troviĝis tiuj, kiuj ĉeestis liajn predikojn pro simpla scivolemo aŭ por ĝui la oratoran arton de la usona pastoro. La templo estis ĉiam homplena, en solenaj tagoj.

La frekventantoj de tiu aŭ alia speco tien venadis sen ia rezistosento, ĉar estas kongrua kun nia eta popolo la emo fari miksaĵon de religioj kaj kredoj ĉiaspecaj, kaj peti helpon de tiu aŭ de alia, laŭ la okazoj kaj laŭ la momentaj suferoj en sia vivo. Se temas pri forigo de baroj en la vivo, ĝi sin turnas al sorĉistoj; se temas pri resanigo de obstina kaj persista malsano, ĝi serĉas spiritiston; sed ne diru al nia humila popolo, ke oni lasu idon sen bapto fare de katolika sacerdoto, ĉar oni nepre ekkolerus: “Ĉu vi freneziĝis? Mia ido, pagano? Dio min defendu!”

Joakimo de la Anĝeloj ne frekventis Mr. Shays, nek la moŝtan Pastron Sodr , en la Sanktejo Nia Sinjorino de Lourdes, ĉar kvankam li naskiĝis en urbo balzamita per incenso kaj plena de sonaj  hoj de litanioj kaj senĉesa sonado de festaj sonoriloj, tamen lin ne entuziasmigis granda religia fervoro. Sed lia edzino, S-ino Engr cia estis tia en ekstrema grado, kvankam ŝi ne multe venadis en la preĝejon, pro siaj hejmaj taskoj. Ili ambaŭ tamen interkon-

sentis pri unu punkto religia romkatolika: bapti senprokraste la idojn, laŭ la Apostola Romi-Katolika Eklezio. Tiel ili faris, ne nur rilate al Klara, la sola postvivinta ido, sed ankaŭ rilate la ceterajn, kiu estis mortintaj.

Ili estis geedzoj de preskaŭ dudek jaroj, kaj ĉi tiu Klara, ilia filino, la dua ido de la paro, trairis tiam sian dek-sepan vivojaron.

La gepatroj zorgis pri ŝi plej atente, dece kaj kareseme; kaj krom la patrino aŭ la patro, akompanis ŝin surstrate nur S-ino Margarida, tre serioza vidvino, kiu loĝis proksime kaj instruis al Klara brodadon kaj kudradon.

Cetere, ĉi tio estis tre malofta kaj okazis nur en dimanĉoj, nome Klara foje eliris el la gepatra domo por viziti la kinejon en kvartaloj Méier aŭ Engenho de Dentro⁽¹⁵⁾, kiam ŝia instruistino pri kudrado pretis akompani ŝin, ĉar Joakimo ne sin proponis, ĉar al li ne plaĉis eliri el la hejmo en dimanĉoj, tagoj elektitaj por lia preferata plezuro, tio estas, ludi kartojn kun kutimaj kunuloj; kaj al lia edzino ne nur ne plaĉis dimanĉaj promenoj, sed ankaŭ promenoj en ĉiuj aliaj tagoj. Ŝi estis nemoviĝema kaj ema resti hejme.

La kutimaj kunuloj de Joakimo por kartludado estis preskaŭ ĉiam ĉi tiuj du: Sinjoro Antônio da Silva Albuquerque⁽¹⁶⁾, lia baptano, ĉar li estis baptopatro de lia sola filino; kaj Sinjoro Eduardo La-

fões⁽¹⁶⁾. Ĉiam la samaj. Ĉiudimanĉe, proksimume je la naŭa horo, jen ili frapis la pordon de la domo de la “poŝtisto”; ili ne envenis en la internon de la loĝejo, sed laŭ la koridoro, kiu situis inter la loĝejo kaj la najbara domo, ili sin direktis al la granda tamarindujo, en la fundo de la korto, kaj sub ĝi staris la tablo, kun la ruĝaj kaj nigraj ludpecoj, faritaj el grajnoj de skino, kaj la kartaro, la teleroj, unu kaliko kaj unu litro da kanbrando, meze, tre ĉarma kaj aroganta, imponanta cinikan defion al la ceremoniecaj konvenoj.

Joakimo de la Anĝeloj jam atendadis, legante sian preferatan ĵurnalon. Apenaŭ ili alvenis, ili interŝanĝis kelkajn vortojn, sidiĝis, “malsekigis la parolojn” per la brandolito, kaj ekludis. Ĉiu ĵetono kostis po unu rejsa.

Dum horoj, atendante la posttagmezan manĝon, kiu preskaŭ ĉiam surtabliĝis je la horo de la kutima vespermanĝo, ili plu ludadis, kaj trinketadis la brandon, sen eĉ unu rigardo al la ĉirkaŭstarantaj montaroj, nudaj kaj ŝtonecaj, kiuj desegniĝis ĉe la alta horizonto.

Iam kaj iam, sed sen longaj intertempoj, Joakimo kriis al la kuirejo: — Klara! Engrácia! Kafon!

El tie iu respondis, kun iom da ĝeno en la voĉo:
— Tuj, tuj!

Tion kaŭzis la fakto, ke la du virinoj, por prepari la kafon, devis forpreni de sur unu el la du fajrujoj de vegetala karbo unu kaserolon de la posttagmeza manĝaĵo, kiu estis preparata, por varmigi la petitan kafon, kaj ĉi tio malfruigis la vespermanĝon.

Dum atendado de la kafo, la tri viroj interrompis la ludadon, kaj iom babilis. Marramaque⁽¹⁷⁾ estis, dum sia tuta vivo, pli-malpli politikema, siamaniere. Kvankam li nuntempe estis simpla ordinara servisto en ministerio, kie li tamen ne plenumis sian servon, nek alian servon, pro sia stato de invalido, de duonkriplulo kaj duonparaliziĝinto je la maldekstra flanko de la korpo, tamen li antaŭe apartenis al modesta rondo de bohemianoj literaturemaj kaj poeziemaj, en kiu, krom poezio kaj literaturaj aferoj, oni diskutis pri multe da politiko, kaj ĉi tiu kutimo restis en li. Kiam okazis la ribelo de 93⁽¹⁸⁾, tiu rondo malaperis. Unuj akompanis Admiralon Custódio⁽¹⁸⁾; kaj aliaj Marŝalon Floriano⁽¹⁸⁾. Marramaque estis unu el ĉi tiuj lastaj, kaj eĉ akiris la honorojn de subleŭtenanto en la Armeo. Tiutempe li eksuferis la unuan ikton, tio estas, fine de la regado de tiu marŝalo, en la jaro 1894.

Lia rondo enhavis neniun elstaran personon, sed kelkaj estis estimindaj. Eĉ homoj el pli prestiĝaj rondoj serĉis la lian.

Kiam li rakontis epizodojn de tiu parto de sia vivo, li montris grandan elegantecon kaj fieron diri,

ke li konis Paula Nei⁽¹⁹⁾, kaj rilatiĝis kun Luís Murat⁽¹⁹⁾. Li ne mensogis, kvankam li ne malkaŝis al ĉiuj, laŭ kia rango li partoprenis en tiu literatura grupo. Kiuj lin konis, de tiu tempo, ne kaŝis la titolon, per kiu li kundividis la honoron esti membro de poeta aro. Li estis peninta versumi, sed lia prudento kaj la seriozeco de lia karaktero igis lin tuj vidi, ke li ne havas talenton por tiu afero. Li forlasis tion kaj ekkultivis ŝaradojn, logogrifojn k.s. Li fariĝis lerta ŝaradisto kaj kiel tia li preskaŭ ĉiam aperis kiel redaktanto aŭ kunlaboranto en ĵurnaloj, kiujn liaj kunuloj kaj amikoj en literatura bohemo, poetoj kaj beletristoj, improvizadis sen ia plano, preskaŭ ĉiam sen mono por aĉeti novan kompletan de vestoj. Post kiam li maljuniĝis kaj fariĝis invalido pro du atakoj de apopleksio, li devis akcepti tiun modestan postenon de servisto, por postvivi. Sed liaj meritoj kaj scio ne staris tre superaj al la posteno. Li lernis multon per sola aŭdado, kaj per supraĵa scio li parolis pri multaj aferoj. Kiam juna, li estis havinta bonajn kompaniojn. Jen kie troviĝis la sekreto de lia klereco.

Marramaque, malgraŭ ĉio, malgraŭ sia sanstato, sia malfacileco moviĝi, ne forlasis la sensencan inklinon al politiko, kaj partoprenis en balotadoj, sub risko esti trafita de ia tumulto en universala voĉdonado, pere de ponardoj, luktofrapoj, kapfrapoj, pafoj per revolveroj kaj aliaj elokventaj manifestiĝoj de balotadoj, el kiuj, pro sia nesufiĉa funkciado de kruroj, li ne povus forkuri sekure kaj sufiĉe rapide.

Vivinte en rondoj de homoj altklasaj — kiel ni jam vidis — ne pro monhavo, sed pro edukiteco kaj kleriĝo; revinte pri alia destino, ekster tiu, kiun li havis; se oni aldonas al ĉio tio lian kripliĝon — Marramaque estis nature acidhumora kaj opoziciema. Tiun dimanĉon li rezervis por kritike paroli pri doktoro Saulo de Clapin⁽²⁰⁾.

— Vi vidos: jen Clapin estas mortinto en politiko. Li havis la aŭdacon kontraŭi la popolan opinion, li ekfalas. Kiu gajnis de tio estis la barbulo Melo Brandão⁽²⁰⁾, tiu mestizjudo. Li estas ia friponego, sed majstro en politiko.

Joakimo apenaŭ interesiĝis pri tiaj aferoj de politiko: sed Lafões havis siajn pasiojn en tiu implikaĵo kaj ekdiris:

— Tute ne! Ĉu vi do supozas, Marramaque, ke homo inteligenta, supera, kiel doktoro Clapin, permesus al si trompiĝi de falsisto de protokoloj kaj eĉ de pli fiaj aferoj, kia Melo Brandão! Tute ne! Krome, la laboristaro...

— Kion li faris favore al la laboristaro? — Marramaque demandis.

— Multon.

Lafões ne estis laboristo, kiel oni povus supozi. Li estis zorganto pri publikaj konstruoj. Li naskiĝis en Portugalujo, alvenis Brazilon kiam li estis knabo, antaŭ pli ol kvardek jaroj; tre frue li enskribiĝis en la departementon de akvoprovizado de la urbo, li vekis

la atenton de siaj superuloj pro sia severa konduto; kaj iom post iom oni promociis lin al lia generaleca posteno de zorganto pri akvotuboj kaj kranoj, kiuj fluigis akvon en tankojn por lavado de privataj domoj. Li vivadis tre kontenta pro sia pozicio, sia nomumo-dokumento, sia dokumento por Brazila civitaniĝo, kaj eble li ne estus same kontenta, se li estus riĉiĝinta je centoj da miloj da milrejsoj. Tiel ŝajnis, ĉar estis klara la naiva graveco, kiun la kamparano atribuis al ĉia afero de la Ŝtato, kaj la solena maniero, per kiu li trairadis tiujn virtualajn stratojn de ĉirkaŭurbaj kvartaloj.

Li ĉiam surportis la kakian uniformon kaj la ĉapon kun komencliteroj de la servofako; sunombrelon kun longa tenilo, kiun, se ĝi ne estis malfermita, por ŝirmi lin kontraŭ sunradioj, li manovris kvazaŭ bastonon de vikario de portugala vilaĝo, borante la grundon kaj levante ĝin, kaj denove ĝin surmetante, laŭgrade kiel li faradis siajn longajn paŝojn.

Jen kiel Lafões respondis al Marramaque:

— Multon. En ĉiuj komisioj, en kiuj la doktoro partoprenis, li ĉiam klopodas doni laboron al plej granda kvanto da laboristoj.

— Granda servo! Li detruas la spezokalkulojn; post du-tri monatoj, li espezas pli ol la duonon... Ĉi tion oni ne nomas protektado; oni nomas ĝin trompo.

— Eble, sed li almenaŭ faras tion, kaj la aliaj? Ili faras nenion. Cetere, li estas demokrata homo. De longa tempo li batalas por egaleco inter la servistoj de la lando. Li ne akceptas distingojn inter publikaj oficistoj kaj ĵurnalvendistoj. Kiu servas la landon, en kia ajn servo, estas publika oficisto.

— Honoroj! Ĉi tio ne plenigas ventron! Kial li ne agadas por malpliigi la vivkostojn kaj luprezojn de domoj?

— Mirinde, Marramaque! Ĉu vi ne legis la projekton por konstruado de domoj por malriĉaj, modestaj familioj? Ĉu vi legis, Joakimo?

La leterportisto, kiu aŭdadis la interparolon sen esprimi sian opinion, intervenis pro la demando de Lafões:

— Efektive, mi legis; sed mi legis ankaŭ, ke li plialtigis la luprezojn de siaj domoj, kiuj estas multenombraj, je kvardek procentoj.

— Precize! — Marramaque tuj diris. Clapin estas tre grandanima koncerne la monon de aliaj homoj, de la Ŝtato. Koncerne sian propran, li estas jude avida, kaj ambicia kiel monpruntisto. Jezuito!⁽²¹⁾

Feliĉe, Klara alvenis kun la kafo. La pasia interparolo ĉesis, kaj la du invititoj de Joakimo ricevis la salutojn de la knabino:

— Vian benon, mia baptopatro; bonan matenon, Sinjoro Lafões.

Ili respondis, kaj komencis ŝerci kun Klara. Marramaque diris:

— Do, mia baptofilino, kiam vi edziniĝos?

— Mi tute ne pensas pri tio — ŝi respondis, kaj faris ĉarman movon.

— Mi dubas! — Lafões rimarkigis. — La knabino jam havas la okulojn turnitajn al iu. Vidu, en la tago de via datreveno... Nu, vere: Joakimo: atentu pri ĉi tio.

La leterportisto surtabligis la tason kaj demandis:

— Kio?

— Mi volas peti vian permeson alporti ĉi tien, en la datrevena tago de la knabino, eminentulon pri gitarludo kaj modaj kantoj.

Klara ne rezistis kaj tuj demandis:

— Kiu li estas?

Lafões demandis:

— Li estas Cassi⁽²²⁾. Vi, knabino...

La gardanto de publikaj konstruaĵoj ne sukcesis fini sian frazon. Marramaque lin interrompis, furioza:

— Ĉu vi havas rilatojn kun tia pustulo? Li estas ulo, kiu ne rajtas enveni en familian hejmon. Almenaŭ ne en la mian...

— Kial? — la hejmestro demandis.